Universala Esperanto-Asocio (en oficialaj rilatoj kun UN kaj Unesko)
La 4-a Virtuala Kongreso de Esperanto • 23 – 26 novembro

# Migranta Hirundo

21-a de novembro 2023, numero 1
Redaktas Dmitrij Ŝevĉenko kaj Anna Striganova

## Migranta hirundo flugas al la 4-a Virtuala Kongreso de Esperanto

Dima Ŝevĉenko kaj Anna Striganova

Karaj legantoj, la kvaran fojon ni havas la honoron saluti vin sur la paĝoj de la kongresa kuriero de la Virtuala Kongreso. Ĉi-jare ĝi havas la nomon *Migranta Hirundo*. Kial? Unue, ĝi aludas la kongresan temon kaj de la 108-a Universala Kongreso, kiu okazis julie-aŭguste 2023 en Torino, Italio, kaj ankaŭ de la 4-a Virtuala Kongreso, ĝis kies komenco restis malpli ol du tagoj: "Enmigrado – kunfluo de homaj valoroj". Due, hirundoj estas tiuj birdoj, kiuj parte migras al Afriko el diversaj partoj de la mondo. Same esperantistoj el multaj landoj venos al Afriko venontjare, en 2024, por partopreni la 109-an Universalan Kongreson en Tanzanio.



Partoprenantoj de la pasintaj tri Virtualaj Kongresoj povas konfirmi, ke ili estis buntaj kaj programe riĉaj. Sendube tia estos ankaŭ la 4-a VK. Ne mankos ankaŭ unika internacia etoso de la Esperanta renkontiĝo, ja VK malfermos la pordojn de la virtuala portalo por esperantistoj el preskaŭ 100 landoj kaj teritorioj. *Migranta Hirundo (MH)* kaj aliaj kanaloj (kiel Telegrama grupo, paĝoj en la sociaj retoj, Gazetaraj Komunikoj de UEA ka.) akompanos vin dum la kongreso kaj ankaŭ post ĝi.

Tradicie viaj kontribuoj por *MH* estas ege bonvenaj! Tio povas esti anoncoj, raportoj kaj impresoj pri la programeroj, okazaĵoj kaj aktivaĵoj dum la VK: interesaj, seriozaj, kuriozaj, solenaj, neformalaj, laŭdaj, kritikaj... Tre bonvenas ankaŭ trafaj ekranfotoj kaj bildoj, kiuj povas akompane ilustri la kontribuon. Ni kreu diversflankan informan bildon pri tiu ĉi plej grava reta Esperanta aranĝo de la jaro.

*MH*, same kiel la pasintjaraj kurieroj, estas senpage elŝutebla. Vi rajtas libere disvastigi ĝin en sociaj retoj, lokaj kaj fakaj dissendolistoj kaj simple resendi al viaj Esperantaj amikoj.


Ĝis la baldaŭa revido en nia virtuala internacia Esperanto-lando! Ni ĝuu la kongreson kune!


*Pri la birdo hirundo en la Esperanta Vikipedio: https://eo.wikipedia.org/wiki/Hirundo


## (Re)spektu kaj reĝuu prelegojn de la 3-a VK!


Ni invitas vin, antaŭĝuante la baldaŭan Malfermon de la 4-a Virtuala Kongreso, (re)spekti kaj reĝui plurajn registritajn prelegojn de la 3-a VK. Spektu, ŝatu kaj ĝuu en la jutuba kanalo *UEAViva*: https://www.youtube.com/ueaviva









# Bonvenon al la 109-a UK, la kanto

La jam konata Esperanta kantisto Joel Muhire (Joe Mo) verkis la tekston kaj komponis la tekston por la kanto *Bonvenon al la 109-a UK*.

La filmeto kun ĝi spekteblas kaj aŭskulteblas en la jutuba kanalo UEAViva: https://mallonge.net/164

La Afrika komisiono kunlabore kun la tanzania Landa Asocio laboregas por certigi la unikecon de la unuafoja UK en Afriko.



**Aliĝu al la 109-a UK per la jena ligilo: *https://uk.esperanto.net/2024***

# Provizora programskemo de la 4-a VK




En la retejo de la kongreso estis afiŝita la provizora programo de la 4-a VK. Vi povas uzi ĝin por fari proksimuman planadon de la programeroj, kiujn vi elektos por la partopreno:

https://vk.esperanto.net/2023/programo/

Preciza kaj aktualiĝanta programo aperos en la sistemo de RetEvent, al kiu ricevos aliron ĉiu aliĝinto de la VK.

La partoprenantoj de la VK venas el diversaj partoj de la mondo, kiuj havas malsamajn horzonojn. Supre de la paĝo kun la provizora programo vi povas agordi horzonon taŭgan por vi.





## Aperis la decembra numero de la revuo *Esperanto*

### La enhavlisto de la decembra numero:


243 | La arkivo de Universala Esperanto-Asocio en la Esperantomuzeo kaj Kolekto por Planlingvoj de la Aŭstria Nacia Biblioteko

245 | UEA: Kion opinias nemembroj de UEA pri la Asocio?

247 | Landa agado | UEA: Agado en Ĉinio

248 | 109-a UK en Aruŝo, Tanzanio, de la 3-a ĝis la 10-a de aŭgusto 2024. Kom tempo gravas?

249 | Universala Kongreso: Bonvenon al la 109-a UK, la kanto

249 | Oficiala Informilo

250 | Kuniĝu ĉe Taso da Teo – komenciĝis nova turneo de Teo, Amo kaj la Mondo

252 | Serio: Pri katedro sed ne el katedro. Kio bolas en la Amsterdama kaldrono

254 | Letero de leganto | Opinio: Varsovio, Roterdamo, Herzberg kaj tiel plu!

255 | Kotiztabelo de UEA por 2024

256 | Eventoj: 81-a Hispana Kongreso de Esperanto en Sevilo 12-15.10.2023

257 | 81-a Hispana Antaŭkongreso de Esperanto en Sevilo 10-11.10.2023

257 | Zamenhof-festoj 2023 en Eventa Servo: sciigu la mondon pri via evento

258 | Fake, Science kaj Profesie tra la mondo: Spaca Universala Kongreso kaj IKU en UEA-viva kaj la VK

259 | Laste Aperis

260 | Belartaj Konkursoj: Aperis Belarta Rikolto 2023

260 | Edukado: Helpu pligrandigi la Esperanto-familion en du aziaj landetoj

261 | Forpasoj

262 | Indekso-2023

# Virtuala Movada Foiro

Partoprenantoj de la fizikaj Universalaj Kongresoj de Esperanto tre bone konas la programeron, kiu kutime okazas dum la alventago – la Movadan Foiron (MF). Dum ĝi, sur speciale aranĝitaj tabloj kaj standoj, diversaj Esperantaj organizoj kaj enterprenoj havas eblon senpage prezenti siajn agadon kaj produktaĵojn. Ekzemple, dum la ĉi-jara 108-a UK en Torino dum la MF-o estis reprezentitaj pli ol cent projektoj. La programero estas ege populara, multaj kongresanoj partoprenas ĝin. Estas ankaŭ la tempo por saluti unu la alian en ne tre formala etoso, trovi konatulojn, rideti al ili kaj admiri amikajn vizaĝojn, kiuj tiel mankis dum monatoj, eble eĉ jaroj. Kaj fieri pri la bunteco de Esperantujo, tiel multkolore kaj vigle prezentata.

Dum la Virtualaj Kongresoj okazas ankaŭ virtuala "versio" de la evento. Diference de la UK, dum la VK-j programeroj kadre de la Foiro okazas ĉiutage. La organizoj havas eblon prezenti sian agadon kelkfoje tra la VK, por ke laŭeble pli da interesatoj povu ĉeesti.

En la programo de la 4-a VK aranĝojn de la Virtuala Movada Foiro vi trovos kun la indiko "ViMF".



# Zamenhof-festoj 2023 en Eventa Servo: sciigu la mondon pri via evento

Ĉu jarfine vi organizos komunan manĝon aŭ alispecan eventon okaze de la naskiĝtago de L.L. Zamenhof? Ni invitas vin vaste komuniki pri via agado.

Eventa Servo de UEA ebligas krei eventan paĝon per kiu vi povas informi en interreto KIAM okazos KIO KIE. Rapide havi aliron al tiaj praktikaj informoj faciligas la vivon de multjaraj esperantistoj. Trovi ĉiujn informojn pri Esperanto-okazaĵoj en unu centra loko (al)logas novulojn. Vidu https://eventaservo.org.




Pasintjare la teamo de Eventa Servo faris kampanjon pri Zamenhof-festoj tra la mondo. La tiama ligilo https://zamenhof.eventaservo.org daŭre funkcias kaj ankaŭ ĉi-jare donas superrigardon pri ĉio, kiam kie kune festos esperantistoj.

Por aldoni eventon al Eventa Servo, necesas registriĝi. Jen instrukcia filmeto kiel fari tion: mallonge.net/es1. Se restas dubo aŭ se vi spertas praktikan malfacilaĵon, ne hezitu sendi retmesaĝon al *kontakto@eventaservo.org*.

**Belajn festojn al vi ĉiuj!**

*(El la Gazetaraj Komunikoj de UEA)*

Sekvu novaĵojn kaj partoprenu diskutojn pri la Virtuala Kongreso en Telegram-grupo:

https://vk.telegramo.org

Vi povas esti aŭtoro de *Migranta Hirundo* kaj la *Reta Revuo*! Por kontribui, skribu al la redakcio



revuo.esperanto@gmail.com

## AI & homoj – prezento de la kvara Interkultura Novelo-Konkurso

Stela Besenyei-Merger

Artefaritaj intelektoj kaj pensantaj maŝinoj jam estas en niaj vivoj. Ĉiam pli, jaron post jaro. Ni pagas en la vendejo en la senkasista vico per la tuŝo de nia saĝa brakhorloĝo. Ni kunportas etan komputilon en niaj poŝoj kaj kapablas aliri pli da novaĵoj kaj informoj per ĝi en unu tago ol averaĝa homo dum sia tuta vivo antaŭ jarcento. AI kaj tiuj maŝinoj estas kreaĵo de la homa cerbo, same kiel viaj noveloj. La Interkutura Novelo-Konkurso estas jam en sia kvara eldono kaj invitas vin verki novelojn kun la temo “Artefaritaj intelektoj, pensantaj maŝinoj kaj Homo sapiens”.



## Ĉu ĉifrovalutoj solvos Esperantajn transpagajn problemojn

KuboF Hromoslav



La Esperanta movado delonge havas problemojn pri pagado inter landoj, ekz. membrajn kotizojn por UEA, aŭ antaŭpagojn por UK. Jam ekzistas pluraj solvoj kaj duonsolvoj, notinde perantoj, sed ankaŭ tiuj havas siajn problemojn. Ĉu novgeneracia paga sistemo uzanta kriptografion povos disbati obstinajn barojn, kiuj de miljaroj staras inter la popoloj dividitaj? Aŭ ĉu temas nur pri magiaj numeroj en ekranoj?

Ekscii tion estis taskite al komuna laborgrupo de UEA kaj TEJO. En la sesio mi prezentos la kriteriojn uzatajn por decidi, kaj dumajn, probable dume nedefinitivajn, rezultojn. Mi multe aprezos viajn demandojn!

**Trovu en la programo de la 4-a VK! Partoprenantoj povos uzi serĉilon de RetEvent!**

## Emblemoj de la Virtualaj Kongresoj

En 2020, la emblemo de la unua Virtuala Kongreso uzis tri primarajn kolorojn: flavan, ruĝan kaj bluan. Nu, kun eta verda steleto ankoraŭ por simboli nian aferon, Esperanton. Kaj tiuj koloroj fariĝis marko de la evento. La emblemoj mem aludas la ĉefajn temojn de la kongresoj.

**VK-1**
UN 75-jara: Dialogo kaj interkompreniĝo en ŝanĝiĝanta mondo

**VK-2**
Paco kaj Konfido: universalaj valoroj

**VK-3**
Lingvo, vivo, tero: Jardeko de Indiĝenaj Lingvoj

**VK-4**
Enmigrado – kunfluo de homaj valoroj

**1172 personoj el 86 landoj (aŭ teritorioj) jam aliĝis al la 4-a VK!**

Se vi ankoraŭ ne aliĝis, tion eblas fari en la paĝo:
https://vk.esperanto.net/2023/aligxilo

Invitu partopreni ankaŭ viajn esperantajn familianojn, kolegojn kaj amikojn!